

64-a jaro n-ro 182 2023:4

la

lampiro



**La potisto  
kaj la poeto**



**15<sup>o</sup>**  
**Congresso**  
**Paulista de**  
**Esperanto**

**30 set - 01 out**

Para mais informações:  
[easp.org.br/asocio/mogi2023](http://easp.org.br/asocio/mogi2023)

Av. Ulisses Borges de Siqueira. 601  
Jd. Universo - Mogi das Cruzes/SP

# Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**  
Zorgiga fenomeno
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**  
Daŭre ĉeeste
- 6 | **Kino kaj aliaj artoj**  
Tarsila do Amaral
- 8 | **Kovrilartikolo**  
La potisto kaj la poeto
- 10 | **Recenzo**  
Interesa fikcia biografio pri konata homo
- 12 | **El mia ĉiutaga vivo**  
Vetero kaj klimato ŝanĝiĝas
- 15 | **Movade**  
Andrea Bocelli kaj Esperanto
- 16 | **Iom da gramatiko**  
Lingvaj Respondoj de Francisco S. Welchsler
- 18 | **El mia vidpunkto**  
La troa uzado de sociaj retoj kaj la konsekvencoj por legado
- 22 | **El mia vivo de instruisto**  
Nesufiĉa logiko
- 23 | **Por iom mediti**  
Ruĝa rozo
- 24 | **Turismado**  
La Municipa Nutraĵo-vendejo en San-Paŭlo
- 25 | **Tutmonde**  
Projekto Savskatolo

la lampiro

64-a jaro n-ro 182 2023:4

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sergio Viana  
(psviana@terra.com.br)

**Enpaĝigo:** José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas  
pri la subskribitaj artikoloj*



## Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

### Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
easp.org.br | contato@easp.org.br

### Estraro

**Prezidanto:** Esmeraldo A. Alencar de Lima  
**Vicprezidantino:** Cristina de Claudia Graaf  
**Sekretariino:** Maria Conceição Rodrigues  
**Kasisto:** José R. Tenorio da Silvas

### Konsilantaro

Paulo Sergio Viana  
José Mauro Progiante

### Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

## Jarkotizo por 2023

Simple Membro .....	R\$ 200,00
Subtena Membro .....	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro .....	R\$ 100,00

## Zorgiga fenomeno

Inter pluraj interesaj tekstoj en ĉi tiu numero de nia Lampiro, mi emas elstarigi tiun de nia nova kontribuanto Patrícia Guerra. Al mi ŝajnas, ke ŝi pritraktas gravan temon, nome la ŝanĝiĝon de la sinteno de ordinaraj homoj rilate al legado.

De longa tempo tiu fenomeno vekas la atenton de fakuloj: ĉu la novaj generacioj perdas parton de sia kapablo kompreni kaj interpreti longajn, ellaboritajn verkaĵojn? Se jes, kiajn rezultojn oni povas atendi?

Ĉu vi, kara leganto de La Lampiro, ankoraŭ glate aprezas librojn kaj longajn artikolojn? Skribu al ni pri tio!

Unu plia atentigo. Ĉu vi, aktiva EASP-ano, pretas uzi la ĵusan mesaĝon de Andrea Bocelli pri Esperanto? Vidu artikolon pri tio en ĉi tiu numero.

Bonan legadon!

**Paulo Sergio Viana**



## Daŭre ĉeeste

Saluton, karaj legantoj de La Lampiro!

Mi deziras al vi pacon kaj feliĉon.

En ĉi tiu jaro 2023, nia ŝtata kongreso okazos ĉeeste, kaj mi invitas vin ĉiujn al partopreno. Ĝi estos simpla, sed ĝoja. Ĝi okazos en la urbo Mogi das Cruzes, ĉirkaŭ 50 kilometrojn for de la metropolo San-Paŭlo. En la tupia lingvo, “mogi” signifas “rivero de la serpento” — laŭ faka vortaro de Eduardo Navarro. Ĝi estas aludo al la rivero, kiu trapasas la urbon.



La urbo situas oriente de la ĉefurbo, kaj inter la du municipoj troviĝas “lim-ŝtono”. Pluraj aliaj urboj havas sian najbarecon kun Mogi das Cruzes. Tamen, ĉi tiu estas unu el la plej vastaj municipoj (pli ol 700 mil kvadrataj kilometroj) en tiu regiono. Mogi das Cruzes estis fondita en la jaro 1611, kaj estis ripozloko por vojaĝantoj inter Rio-de-Janeiro kaj San-Paŭlo.

Nia kongreso estos bona okazo por ke vi konu ĉi tiun malnovan, gastaman urbon!

Pliajn informojn pri la evento, inkluzive de la aliĝilo, vi trovas en nia retejo:

<https://easp.org.br/asocio/mogi2023/>

Se vi havas iun demandon pri la evento, vi povas vin direkti al:

<contato@easp.org.br>

**Esmeraldo Aparecido de Alencar**

## Tarsila do Amaral

Kiam mi decidis krei tiun ĉi serion pri famaj artistinoj, por elstarigi kaj enpovigi virinojn en arto, mi decidis paroli pri la brazilano Tarsila do Amaral. Ŝi sendube estas unu el la plej famaj latinamerikaj artistinoj el Moderna Arto. Krom pentristino, ŝi ankaŭ estis desegnisto, skulptisto, ilustranto, verkisto kaj tradukisto.

Ŝi naskiĝis je unua de septembro 1886 en la urbo Capivari. En tiu tempo, virinoj ne estis devigataj strebi en edukado kaj pensi pri profesia kariero. Ĉefe kiam temas pri riĉa familio, kiel estis ŝia okazo. Tamen, ŝia familio apogis ŝian studadon.

En sia adoleskaĝo, ŝi kun la familio vojaĝis al Hispanio, kie ŝi alvokis atenton de la homoj per siaj desegnaĵoj kaj pentraĵoj de kopioj el artaĵoj kiujn ŝi vidis en arkivejo de sia lernejo. Ŝi studis en lernejo de Barcelono kaj poste studis en sia naskiĝurbo kun la pentristo Pedro Alexandrino Borges.

De 1916, Tarsila ekstudis pentradon en la urbo São Paulo, tre respektive sed konserveme. Unu el la kuriozaĵoj de tiu tempo, estas ke oni imagas ke tiam ŝi komponis kanton en “A minor” kiu nomiĝas “Rondo D’Amour” kiu restis nekonata ĝis novembro de 2021, kiam ĝia partituro estis malkovrita en la domo de nev-nepino en Campinas. Poste, je la 25-a de januaro 2022, la muziko estis regis-trita.

De 1920 al 1923 ŝi eniris la Academie Julian en Parizo kaj studis kun aliaj elstaraj artistoj. Ree en São Paulo post pariza tempo, ŝi ekkonis Anita





Malfati, Oswald de Andrade, Mário de Andrade kaj Menotti de Picchia. Kune, ili formis apartan grupon, kiu estis nomata “La grupo de la Kvin”.

Antaŭ ŝia alveno el eŭropo, tiu grupo estis kreanta la “Semajno de la Moderna Arto”, kiu okazis de 11-a ĝis 18-a de februaro 1922. Tiu evento estis ŝlosilo por la disvolviĝo de la Brazila Modernismo.

Inter vojaĝoj al Eŭropo, kie ŝi konis “kubismon”, “futurismon” kaj aliajn stilojn de pentrado, Tarsila disvolvis sian stilon, kies ĉefa trajto estas la reveno al tre forta brazila kulturo, kaj kiu poste kulminis en la “Antropofagia Manifesto” kiu alvokas artistojn “manĝi” eŭropecajn stilojn, liberiĝi de ĝiaj direktaj influoj kaj ekkrei sian propran stilon.

Kvazaŭ ŝi estus malmulte vojaĝinta en vivo, ŝi denove vojaĝis al Rusio en 1931, kie ŝi faris kelkajn ekspoziciojn, akompanata tiam de sia edzo Oswald de Andrade. Revene al Brazilo, ŝi alfrontis la diktaturon de Getulio Vargas kaj estis katenita dum monato, pro tio



*Abaporu (1928)*

ke ŝi estis konsiderita kiel komunisto. Dum la fino de sia vivo, Tarsila restis ĉefe en São Paulo kaj koncentriĝis ĉefe pri sociaj temoj.

Ĉu vi konis pri ŝia vivo? Mi persone multe malkovris dum tiu ĉi verkado, kaj mi esperas ke ĝi inspiris vin koni pli pri Tarsila do Amaral, konsiderata la plej suna kaj brazila artisto kaj ankaŭ esplori pri tiu grava arta movado de Brazila Modernismo.

**Anna de Carvalho**



## Mogi das Cruzes 2023

30 sep - 01 okt 2023

<https://easp.org.br/asocio/mogi2023>

# La potisto kaj la poeto

La okazintaĵo en la strato Bardauini ŝajnis vere serioza. Neatendita kverelo estiĝis inter la juna Fauzi, la poeto, kaj la potisto Nagib. Scivolemuloj amasiĝis antaŭ la domo de la potisto. La demandoj kruciĝadis:

— Kio okazis? Kiel? Ĉu ili interbatalis?

Policano, por evitigi pligravigon de la tumulto, decidis konduki la du kverelantojn antaŭ kadion, tio estas juĝiston.

Tiu juĝisto, honesta kaj bonkora homo, pridemandis unue la potiston, kiu al li ŝajnis pli ekzaltita:

— Sed finfine, mia amiko, pri kio temas? Laŭdire vi estis atakita! Ĉu tio estas vero?

— Jes, via juĝista moŝto — konfirmis senbride la potisto —, mi estis atakita en mia propra domo, fare de tiu poeto. Kiel kutime mi laboris en mia metiejo, preparante du novajn kolorajn vazojn, kiujn mi intencis vendi al

la princo Farid, kiam mi aŭdis sekan bruon kaj, tuj poste, ke io falis. Baldaŭ mi komprenis, kio okazis. La poeto Fauzi, kiu tiam transiris la straton Bardauini, perforte ĵetis ŝtonon kaj rompis unu el la vazoj — pretan vazon, kiu sekiĝis apud la pordo! Nu, via moŝto, tio estas atenco, krimo! Mi estas en mia rajto: mi postulas kompenson!

La juĝisto turnis sin al la poeto kaj serene demandis lin:

— Kion vi havas por sin defendi, mia amiko? Kiel vi pravigas vian strangan faron?

— Via juĝista moŝto — respondis la junulo, retenante impulson de kolerero —, la afero estas tre simpla kaj mi emas kredi, ke mi pravas. Antaŭ tri tagoj, kiam mi revenis el la moskeo kaj preterpasis la domon de la potisto Nagib, mi aŭdis lin deklamantan unu el miaj poemoj. Mi rimarkis, kun malĝojo, ke la versoj estis eraraj; la potisto mutilis, tio estas, rompis miajn versojn. Mi alproksimiĝis al li kaj delikate



lernigis al li la ĝustan formon, kiun li ripetis sen granda malfacileco. En la sekva tago, denove pasante en tiu sama loko, mi ankoraŭfoje aŭdis la potiston ripetantan la samajn misparolitajn versojn, tio estas, en erarega formo. Plena de pacienco mi denove lernigis al li la korektan formon kaj petis de li ne plu mutili miajn poemojn. Hodiaŭ, fine, mi revenis el la laboro, kiam, pasante en la strato Bardauni, mi rimarkis, ke la potisto deklamas mian poeziaĵon, kripligante la rimojn kaj hontinde mutilante la versojn. Mi ne regis min. Preninte ŝtonon, per ĝi mi rompis unu el liaj vazoj. Kiel vi vidas, via juĝista moŝto, mia faro ne estis pli ol repago de poeto, kies artisma sentemo estis vundita de krudulo.

Aŭdinte la argumentojn de la poeto, la juĝisto turnis sin al la potisto kaj deklaris:

— Ke tiu okazaĵo, ho Nagib, estu por vi leciono por la estonteco! Provu respekti la aliulajn verkojn, por ke la aliaj artistoj respektu la viajn. Same kiel vi pensis, ke vi havas la rajton difekti la versojn de la poeto, la poeto pretendis la rajton rompi vian vazon. Memoru, ke poeto estas potisto de la frazo, dum bona potisto estas poeto de la ceramiko!

Kaj la verdikto de la nobla kadio estis la jena: — Mi ordonas, ke la potisto Nagib faru novan vazon kun perfektaj linioj kaj harmoniaj koloroj, sur kiu la poeto Fauzi skribu unu el siaj belaj versoj. Tiu vazo estu vendita per aŭkcio kaj la monprofito estu egale dividita inter ambaŭ.

La novaĵo pri tiu kazo disvastiĝis tra la urbo. La potisto vendis multajn vazojn kun versoj de la poeto Fauzi kaj ambaŭ fariĝis prosperaj kaj riĉaj. Ili daŭre restis bonaj amikoj. La potisto montris sin ravita, kiam li aŭdis la versojn de la poeto; ravis la poeton la senpekaj vazoj de la potisto.

Dio nin benu!

*(Malta Tahan, pseudonimo de la brazila verkisto Julio Cesar de Mello e Souza (1895-1974) – Rakonto originale verkita en la portugala lingvo, esperantigita de José Mauro Progiante)*



# Interesa fikcia biografio pri konata homo

**Verko:** *”Kaj staros tre alte...”*

**Aŭtoro:** *Trevor Steele*

**Eldonis:** *”IEM - Vieno, 2006*

La romano de Trevor Steele, “Kaj staros tre alte...” estas tre interesa fikcia biografio, bele konceptita. La aŭtoro donis la parolon al romiano el la tempo de Jesuo, kiu verkis sian version pri lia vivo. La tuta rakonto montras homon, ne ian dion. Kompreneble, temas pri eksterordinara homo, sed ja homo. Oni montras lin kiel infanon, kiel junulon, kiel maturan viron, kun ĉiuj trajtoj de “normala” persono, eĉ kun amsentoj al virino kaj duboj kaj konjektoj pri lia misio en la vivo. Li ja posedis, laŭ la rakonto, siajn “paranormalajn” kapablojn, rilate al la sanstato de homoj, al resanigado per mensa forto, ankaŭ rilate ilian spiritostaton. Li krome estis aparte bonkora kaj inteligenta.


Aparte kuriozaj estas la priskriboj de epizodoj, kiujn la tradicio traktas kiel “miraklojn”. En la romano, ili estas racie kompreneblaj okazaĵoj, aŭ simple pridubataj faktoj, koncerne la vericon. Alia talenta aspekto de la verko estas la analizoj pri la politikaj streĉaj situacioj, inter la judaj kaj romiaj aŭtoritatuloj. Ankaŭ korupto de tiuj aŭtoritatuloj estas detale montrata.

La tuta verko estas konstruita per tiel flua lingvo kaj rakontostilo, ke ĝi legiĝas tre plezure. La scenoj estas konvinke verecaj kaj naturaj, foje kun subtilaj trajtoj. Tia estas ekzemple la fragmento, kiu traktas pri la agado de Johano, la Baptisto.

Dum la legado, eble oni starigas al si la demandon: “Ĉu ĉi tiu romano impresas pli agrable ol la seka biblia teksto?” Nu, tio dependas de persona gusto kaj de spirita libereco, flanke de la leganto. Eble tre ortodoksaj kristanoj povus konsideri ĉi tian libron hereza. (Ilo simila okazis al la portugalo José Saramago, kiam li aperigis sian verkon “La Evangelio laŭ Jesuo Kristo”.) Miaopinie, ĝi estas belega fikciaĵo, kreeme elpensita kaj talente realigita. Kaj ĝi montras la potencon de la personeco de tiu, kiu eble estis la plej impresa homfiguro en la tuta historio de la homaro: Jesuo. Iuj kredas, ke li estas Dio en homa formo; aliaj, ke profeto, pri kiu oni kreis fabelojn; kaj

estas ankoraŭ aliaj, kiuj asertas, ke li entute neniam ekzistis. Iel ajn, lia biografio ĝis nun vekas intereson tra la mondo, kaj liaj instruoj inspiras vivon de multaj personoj, ĉu kredemaj, ĉu nekredemaj.

Kiel literaturaĵo, “Kaj staros tre alte...” nepre povas kontentigi ĉiajn gustojn.



Trevor Steele



## Vetero kaj klimato ŝanĝiĝas

La kunsido por administraj decidoj de nia klubo de Esperanto, ĉi tie en Pasargada, estis la kialo de la nova prelego de nia lasta kulturkunveno, sed vi, karaj legantoj, tute ne imagos, kio okazis. Tion mi raportos ĉi tie. Bone, la problemo ekde la komenco estis la ventolilo de la salono, kiu ne funkciis, kaj bedaŭrinde la varmo en tiu tago estis tre forta. Post duonhoro, la personoj plendis, eĉ diskutis. Pro tio, post la administraj decidoj, la babilado sin direktis al la ne elport-ebla varmo en tuta la mondo. Ni ne bone komprenas pri vetero kaj klimato de la mondo, kaj eĉ ne scias la signifon de vortoj kiel klimatologio, meteorologio, kaj aliaj. Pro tio Blanketo sugestis unu prelegon pri tiu temo, farotan de lia amiko, profesoro Toni, por alporti novajn ideojn al ni. Li klarigis ke lia amiko esploras tiun fakon, kaj ankaŭ, ke li scias iomete Esperanton, kun lia helpo la prelego estus ebla. Jen la vero, la nefunkciado de simpla ventolilo donis temon al la kulturkunveno, vere amuze, ĉu ne?



Prof-ro Toni preparis belajn diapozitivojn, por klarigi la konceptojn kaj kun la helpo de Blanketo, la prelego estis tute esperante. Mi resume prezentos ĝin al vi, karaj legantoj.

Unue, li demandis al ni: kio estas meteorologio? Post kelkaj respondoj, li klarigis ke ĝi estas difinita kiel la scienco kiu studas la fenomenojn kiuj okazas en la atmosfero. La atmosfero estas dinamika, kaj diverse interagas kun tera surfaco kaj inter ĝi mem.

La alia demando, estis pri tutmonda varmiĝo kaj kial ĝi okazas. Bone, ni ankaŭ nur babiladis, kaj li estis objek-

tiva, kaj diris: “Ĝi estas laŭgrada pliiĝo de la averaĝaj temperaturoj de la oceanoj kaj de la tera atmosfero, kiu havas sekvojn por flaŭro kaj faŭno, kaj ĉi tiu varmiĝo estas kaŭzata de forceja efiko”.

Tuj venis la unua demando al la preleganto. Maljuna sinjorino Irene volis scii kio estas ‘forceja efiko’. Li dankis la partoprenon de la simpatia Irene, kaj klarigis: “Ĝi estas fenomeno de pliiĝo de la temperaturo de la malalta atmosfero de Tero, estigata de gasoj. Por ekzempligi la ideon, li raportis pri karbondioksido, akvovaporo, ozono, metano kaj aliaj, kiuj sorbas kaj poste resendadas la infraruĝan radiadon de la tersurfaco.

Sed, mi ĉiam pensis ke ĝi estas natura fenomeno, parolis s-ro Pedro. Ĉu ĝi ne estas?

Jes, vere ĝi estas — respondis prof-ro Toni. — Kvankan forceja efiko estas tute natura fenomeno, ĝi estas pli-fortigita per la forcej-efikaj gasoj rezultantaj de homaj intervenoj. Jen la vera problemo malantaŭ ĝi.

La alia demando estis farita de la junulino Mara, kiu volis scii kiuj estas la ĉefaj kaŭzoj de tutmonda varmiĝo. - La respondon tuj faris ŝi mem, kompletigante la demandon: “ĉu la brul-

ado de fosiliaj brulaĵoj kaj senarbarigo estas la ĉefaj fontoj de tiuj gasoj en la atmosfero?”

Jes, vi jam respondis ĝuste. — Bedaŭrinde, li diris kun malgaja mieno; laŭ Unuiĝintaj Nacioj, 2020 estis la jaro kiam ni rompis la rekordon pri karbonkoncentriĝo en la atmosfero. Vere, la fosiliaj brulaĵoj, kies uzo eligas tunojn da karbondioksido en la atmosferon ĉiujare, estas gravega problemo.

Sed, ankaŭ fajroj respondecas pri la liberigo de milionoj da kromaj tunoj da CO<sub>2</sub>. Arba tranĉado, kaj fajroj en vegetajaj areoj, malaperigantaj parton de arbaroj, havas konsiderindan efikon al mondvarmiĝo.

Li parolis pri aliaj kaŭzoj, sed ni ĉiuj komprenis ke la efikoj de mondvarmiĝo videblas en la pliiĝo de la averaĝa temperaturo de la planedo, kiu pliiĝas jaron post jaro.

Unuiĝintaj Nacioj antaŭdiras eĉ pli grandan altiĝon de temperaturoj en la 21-a jarcento, kiu povos atingi 4 °C antaŭ la fino de ĉi tiu jarcento.

Kvankam la teorio estas tre grava, li komentis ke aliaj sciencistoj argumentas ke jam estis aliaj periodoj en la historio de la planedo, en kiuj la temperaturo altiĝis, kaj pro tio, homa ago kiel kaŭzo de la kresko de temperaturo

ankoraŭ estas nesufiĉa. La afero meritas diskutadon.

Irene denove levis la manon, kaj petis: Parolu al ni pri la ĉefaj problemoj kaŭzataj de tutmonda varmiĝo. — Bone, diris s-ro Toni, ni povas citi la degelon de polusaj glacioj, kaj pro tio poste ni vidos altiĝon en oceannivelo, kaj eble inundon en la pli malaltajn regionojn aŭ ĉe marnivelo. Ankaŭ plimalboniĝo de la aer kvalito, pro altaj koncentriĝoj de karbono en la atmosfero, krom antaŭenigo de dezertiĝo kaj reduktado de biodiverseco.

Fine, li lasis la vojon sekvindan. Unue, edukado por prizorgi la medion estas nia defio, nune kaj por estontaj generacioj. Ebligi la konservadon de la medio kiu inkluzivas la vivon en ĝiaj diversaj formoj de flaŭro kaj faŭno. Oni bezonas vivkvaliton, sed kun media konservado, kaj ĉiam, ie ajn, antaŭenigi respekton al la medio.

Lia lasta demando al ni estis: “Ĉu vi konscias, ke niaj agoj, kiom ajn malgrandaj ili ŝajnas, povas havi grandan efikon sur la planedo? Do, mi sugestas al vi, karaj, tri paŝojn por krei novajn kutimojn adoptindajn en la ĉiutaga vivo. Unue, pripensu la uzadon de la akvo. Jes, ŝparu akvon por konservi la medion. Due, ni devas protekti la

medion, kaj unu vojo estas per racia uzado de energio. Trie, ni devas zorgi pri recikligo. Mi atentigas vin ke la reuzo de materialoj por novaj celoj estas simpla kaj bone helpas la medion, ni ne forĵetu ion se ĝi povas esti reuzita.

Jen, resume, la prelego farita de prof-ro Toni. Diversaj sugestoj alvenis de la partoprenantoj, por apliki la tri paŝojn ĉe nia ĉiutaga vivo, sed ĉi tie ne eblas raporti ĉion. Pro tio, mi lasas al vi, karaj legantoj, la defion esplori la aferon, kaj krei novajn kutimojn kunlaborante por konservi la medion. Jes, ni ne rajtas nur plendadi pri la varmo, sed ni devas agi, ĉu ne?

**David Bianchini**

*davidesperantista@gmail.com*





# Andrea Bocelli kaj Esperanto

En la inaŭgura ceremonio de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, en Torino, en julio 2023, unu aparta informo vekis la atenton kaj intereson de ĉiuj kongresanoj: Andrea Bocelli mesaĝis al la Esperantistoj. Efektive, estis legita simpatia kaj sincertona mesaĝo de tiu granda, mondkonata artisto, per kiu li esprimis sian simpatian al la ideologio kaj valoro de Esperanto kaj ĝia kulturo. La tuta teksto estas legebla en la retejo de Universala Esperanto-Asocio. Jen ĉi tie ni elektis fragmenton, kiu ŝajne plej trafte esprimas lian konsideron pri nia movado:

*“... mi nepre deziras esprimi mian tutan simpatian al idiomo, kiu – same kiel bonkvalita muziko – disbatas barojn kaj konceptiĝis laŭstatute por kunigi, por faciligi la dialogon inter la popoloj.*

*Antonomazie universala lingvo, Esperanto kuntrenas filozofian projekton kaj etikan plusvaloron kun eksterordi-*

*nara kvalifiko. Naskita el revo, nenies unua lingvo kaj do potencie ĉies dua lingvo, aldone mi amas Esperanton, ĉar ĝi portas eĉ en sia nomo la forton de atendo, de fido al la homaro kaj al la kapablo venki la evoluon de konflikto (kiu estas, ĉiam kaj en ĉiuj ĝiaj formoj, nenio alia ol intelekta akcidento).*



Andrea Bocelli

*Paco en si mem estas la plej oportuna kaj evidenta afero, kiun la homaro devus celi. Nu, mi opinias, ke Esperanto povas alporti signifoplenan helpon al ni ĉiuj, kunloĝantoj de la tero, por atingi tiun celon, por transformi la revon en realon.”*

Kompreneble, Esperantistoj en la tuta mondo uzas deklarojn de eminentaj homoj, en plej diversaj kampoj de la intelekto kaj arto, kiel argumentojn por Esperanto, kiel solvo de la lingva problemo. Jen nun ni disponas pri unu plia citaĵo. Ni diskonigu ĝin en neesperantistaj medioj! Andrea Bocelli liveris al ni unu plian kontribuon pri la valoro de Esperanto. Ni uzu ĝin!

# Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler



## Demando

Zamenhof foje uzis akuzativon post *kontraŭ*, foje li ne uzis: *ŝi levis **kontraŭ** la junan virinon siajn okulojn; iri milite **kontraŭ** iun; por la nokto oni starigis la kofrojn **kontraŭ** la pordo*. Kiam oni devas uzi akuzativon post *kontraŭ*?

## Respondo

La prepozicio *kontraŭ*, laŭ PMEG, indikas unu el ok signifoj, nome: 1. pozicion kun direkto; 2. ŝanĝon en kontraŭan pozicion; 3. movon kun direkto; 4. malamikan agon aŭ intencon; 5. forigon aŭ defendon de malbono; 6. interŝanĝon; 7. direkton de sento aŭ ago; 8. komparon. Eblas uzi la N-finaĵon nur en la situacioj 2, 3, 4 kaj 7. La sekvantaj ekzemploj espereble klarigos la aferon, kaj pliajn ekzemplojn kaj klarigojn vi trovos ĉe PMEG.

### 1. Pozicio kun direkto:

*Nur en la unu domo, kiu staris rekte **kontraŭ** la loĝejo de l' alilanda instruitulo, estis tute silente [...]* (DL)

*“Ĉu vi scias, kiu loĝis en la domo **kontraŭ** ni?” demandis la ombro* (DL)

*[...] la patrino kaj la filino staris unu **kontraŭ** la alia* (FA4)

*[...] la keruboj estu etendantaj siajn flugilojn supren, [...] kaj iliaj vizaĝoj estu unu **kontraŭ** la alia* (MT)

*Kaj la Eternulo paroladis kun Moseo vizaĝon **kontraŭ** vizaĝo, kiel parolas homo kun sia amiko* (MT)

### 2. Ŝanĝo en kontraŭan pozicion:

se temas pri poziciŝanĝo tia, ke rezulte la priskribataj objektoj aŭ estuloj nun troviĝas unu kontraŭ la dua (alivorte, en la situacio 1), tiam oni uzu la N-finaĵon:

ŝi levis **kontraŭ** la junan virinon siajn okulojn (M)

**3. Movo kun direkto:** oni ne bezonas la N-finaĵon indikante movon per *kontraŭ*, tamen ofte oni ja uzas ĝin por emfazi la atingon de tiu movo:

*Batadi kiel fiŝo kontraŭ glacio* (PV);

[...] sovaĝa hajlo flugas **kontraŭ** liajn tempiojn (R)

[...] vi leviĝis nun **kontraŭ** la domon de mia patro (MT)

Li kuras **kontraŭ** min kiel batalisto (MT)

#### 4. Malamika ago aŭ intenco:

Eligu min el la reto, kiun ili metis **kontraŭ** mi [...] (MT)

li kolektis [...] cent okdek mil elektitajn militistojn, por militi **kontraŭ** la domo de Izrael [...] (MT)

[...] Mi levos Min kun glavo **kontraŭ** la domon de Jerobeam (MT)

(La ideo pri movo kun atingo estas klare esprimita en la tria ekzemplo, sed ne en la du unuaj.) Jen pliaj tri ekzemploj:

[...] ne ekzistas eĉ la plej malgrandaj faktoj, kiuj parolus **kontraŭ** tia ebleco [...] (EE)

Leviĝu, iru en la grandan urbon Ni-neve, kaj prediku **kontraŭ** ĝi (MT)

Ekzemple neniu povus protesti **kontraŭ** la uzado de la vortoj “aŭtoro”, “telegrafo” k.t.p. (LR)

#### 5. Forigo aŭ defendo de malbono:

[...] ŝi esperis ricevi pecon da pano, kiu devis gardi **kontraŭ** mizero la lastajn tagojn de ŝia elturmentita vivo (M)

[...] tamen ĝis nun oni ĉiam ankoraŭ havis la eblon ŝirmi **kontraŭ** la sablo la tombojn (FA4)

[...] gardi la lingvon **kontraŭ** anarĥio [...] (LR)

#### 6. Interŝanĝo:

La ĉifonojn, kiujn li portas sur si, mi ne ŝanĝus **kontraŭ** la purpuro de reĝoj (H); “Sed la anseron mi denove interŝanĝis **kontraŭ** kokino!” diris la edzo (FA4).

#### 7. Direkto de sento aŭ ago:

Kiel vi povas koleri **kontraŭ** li? [...] (R); Permesu al mi saluti antaŭe vin en tia maniero, por ke mia sintenado **kontraŭ** la aktoroj [...] (H).

Mallongigoj: DL = *Dua Libro*; EE = *Esenco kaj Estonteco*; FA4 = *Fabeloj de Andersen 4*; H = *Hamleto*; LR = *Lingvaj Respondoj*; M = *Marta*; MT = *Malnova Testamento*; PMEG = *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*; R = *Rabistoj*;

# La troa uzado de sociaj retoj kaj la konsekvencoj por legado

“En Brazilo, 44% el la loĝantaro ne legas kaj 30% neniam aĉetis libron”<sup>1</sup>

Mi ĉiam ŝatis rigardi tra la retrospegulo de la Historio por povi observi tion, kio el la pasinteco restas en niaj tagoj. Pierre Nora<sup>2</sup> klarigis, ke memoro pendas en lokoj, kiel Historio en eventoj. Tial, per datumoj kaj eventoj, ni provos parte analizi la trajektorion de interreto, sociaj retoj, dinamikon de informoj kaj ĝian efikon al legadokutimoj.

Ni povas listigi plurajn historiajn, kulturajn, ekonomiajn kaj edukajn ins-

tigojn por pensi pri la problemoj, kiuj implikas la legokutimojn de brazilanoj. Tamen, estas palpeble en la tutmond-igita mondo, en kiu ni vivas, observi tre atente la daŭran, senĉesan kaj pli-gravigitan uzadon de sociaj retoj dum pluraj generacioj.

Por tio, mi invitas la legantojn observi kelkajn historiajn eventojn, kiuj marŝis mane en mane tra la Historio, de la alveno de la interreto en Brazilo ĝis la nuna disvastiĝo de sociaj retoj kaj iliaj influoj sur la legado de la brazila popolo.

Kun la transmigrado de la portugala reĝa familio al Brazilo, brazilaj edukaj modeloj spertis signifajn ŝanĝojn. Antaŭ la alveno de la portugala reĝa familio en Kolonia Brazilo, ni havis jezuitajn instruistojn ĉe la avangardo de edukado, ĉar unu el la postuloj por iĝi ordenito estis frekventi kurson ekvivalentan al supera edukado en instruado. Post la elpelo de la jezuitoj el Brazilo, la lando restis en



granda malsukceso koncerne edukadon. Alfabetigo ŝanĝis sian kurson, alfabetigo restis ĉiam pli elitisma, kun pli kaj pli da limigoj por tiuj, kiuj havis havaĵojn por pagi por instruado. Ekzemple, per gvidinstruistoj. Tiu ĉi panoramo komencas ŝanĝiĝi en 1808, kun malrapidaj kaj mallongaj paŝoj, la gazetaro komencas cirkuli en Brazilo, tra la fonda de la Reĝa Gazetaro (**Imprensa Régia**), kie aperis la unua brazila presaĵo, Gazeta do Rio de Janeiro. Ni atentigas, ke en la sama jaro, Correio Braziliense jam estis lanĉita, tio estas, ĝi estas pli malnova. Tamen, ĝi estis presita en Londono. Ĵurnaloj, broŝuroj kaj revuoj timeme alvenis en nian landon, kaj kune kun tiuj malrapidaj paŝoj, alfabeteco. Estis malmultaj riĉuloj kiuj havis aliron al alfabetigo, ĉi tiu perspektivo ŝanĝiĝos malrapide dum la Brazila Imperio kaj nur kun la respublika apero en 1889, Brazilo komencos vidi klopodojn organizi sistemon de publika kaj libera instruado. Iom post iom, la brazila Ŝtato komencis proponi senpagan publikan edukadon al siaj civitanoj, kaj ĉi tiu fakto estas garantiita ekde la ekvalidiĝo de la Konstitucio de 1891, kie ĉiuj estis konsiderataj egalaj antaŭ la leĝo. De la fino de la 19-a jarcento ĝis la komenco de la 20-a jarcento, estas intensa debato pri la eduka afero, per datumoj, oni rimarkas, ke la analfa-



Orfa knabino el Amsterdamo, de Nicolaas van der Waay (1855-1936)

beteco-procento komencis regressi. Tamen, la divido de socio en edukaj niveloj inter malriĉuloj kaj riĉuloj daŭre ekzistas. Nuntempe, analfabeteco iras preter legopovo, ni komencas trakti la kapablon interpreti tekstojn, rapide dissendi informojn kaj aliri novajn teknologiojn.

Nelson Werneck Sodré<sup>3</sup> atentigas, ke la gazetaro naskiĝis kun kapitalismo kaj akompanis ĝian evoluon. Ni rimarkas la saman fonon por interreto. Tiuj transformoj komencis disvolviĝi

pli efike kun la alveno de la interreto en Brazilo en 1995 kaj en postaj jaroj, okazis eksplodo de la interreto kiel vaste disvastigita kaj akceptita tutmonda reto. Interreto hodiaŭ estas la plej efika rimedo por tuja komunikado. La generacio de tiuj, kiuj, kiel mi, naskiĝis en la 90-aj jaroj, travivis la eksplodon de la interreto, la tubokomputiloj kaj la apero de la sociaj retoj. Fakte diversaj aspektoj de la vivo akceliĝis kaj dinamikiĝis. Interreto hodiaŭ ebligas al homoj aliri nemezureblan kvanton da informoj kaj eblecoj. Sed ni devas pensi, ĝis kia grado ni povas sorbi ĉi tiun ilon en sana maniero. Kiel notite Nelson Rodrigues<sup>4</sup>: Ĉia unuanimeco estas malsaĝa. Tial gravas, ke ni kune pensu pri la eblaj respondoj al la senfinaj demandoj, kiuj ekestas; Ĉu la lastaj generacioj de homoj pli kaj pli proksimiĝas al la virtuala mondo, malutile al la reala mondo? Ĉu la presita libro havas spacon inter infanoj kaj junuloj? Kiomgrade la virtuala libro anstataŭas la paperan libron?... inter multaj aliaj demandoj.

"Esplorado de IBGE 20225 montras, ke 155,7 milionoj da brazilanoj havas aliron al interreto", ĉi tiu datumo konfirmas la ideon, kiun mi realigis en la klasĉambro, dum la 10 jaroj, kiam mi laboris en la kampo de Historio en primara kaj sekundara edukado. Sam-

tempe, interreto havas la kapablon provizi rapidajn informojn ĉe niaj finprojoj. Mi rimarkis, ke infanoj kaj junuloj preferas interretan legadon ol surpapere. Junuloj disvolvas kognan malpaciencon, kiu ne favoras kritikan legadon. Ni estu klaraj, ĉi tio estas realaĵo, kiu ne ŝanĝiĝos baldaŭ. La demando estas kompreni, kiomgrade la instalaĵoj de rapida interreta legado influas la perdon de la kapablo por profunda kaj kritika legado. Kogna neŭroscien- cisto Maryanne Wolf<sup>6</sup> substrekas tion: *"la fakto ke ni legas pli kaj pli sur ekranoj prefere ol papero, kaj la ĉiam pli ofta praktiko de nur supraĵe "rigardi" tra multoblaj tekstoj kaj interretaj afiŝoj povas malpliigi nian kapablon kompreni kompleksajn argumentojn, fari kritikan analizon pri tio, kion ni legas"*. La aŭtoro ankaŭ klarigas, ke la kapablo legi estas io konstruita kaj disvolvita tra la jarcentoj de homoj, tial nia kapablo legi kaj interpreti tekston estas parto de cirkvito, nomata de la aŭtoro la legocirkvito. Io, kio devas esti konstante konstruata kaj konservata. Kvankam ni konas la avantaĝojn de interreto kaj rapida legado por simpligi kaj demokratiigi nian vivon kaj precipe la edukan kampon, estas interese analizi kaj konscii pri tio, kio okazas al nia kogna kapablo koncerne legadon.



Ĉi tiuj vortoj celas stimuli scivoleman kaj kritikan menson. Kaj ĉefe, ku-raĝigi kritikan rezonadon kiel la ĉefan vakcinon por la venontaj generacioj kontraŭ malprofunda informo. Pensu pri tio..!

## Patrícia Guerra Radsack

Carangola MG

*Magistra studento ĉe Universitato Salgado de Oliveira – Campus Niterói-RJ. Diplomiĝis pri Historio ĉe la Universitato Salgado de Oliveira en São Gonçalo – RJ. Kvalifikita en Geografio, Sociologio kaj Filozofio. Mezlerneja instruisto en la Privata Instrua Reto ĉe la Oficina do Saber Lernejo en Carangola – MG. Instruisto ĉe la Antaŭ-ENEM Kunteksta Kurso – Carangola, Espera Feliz kaj Divino-unuoj. Disvolvas esploradon en la areo de krimeco en la regiono de Santa Luzia do Carangola fine de la 19-a jarcento.*

### PIEDNOTOJ

- 1 Publikigo Retratos da leitura no Brasil. <http://plataforma.prolivro.org.br/retratos.php>. Alirita la 18-an de julio 2023.
- 2 Pierre Nora estas franca historiisto de la tria generacio de la Lernejo de Annales, asociita kun la kampo de la tielnomita Nova Historio. Alirita la 18-an de julio 2023.
- 3 Nelson Werneck Sodré estis brazila profesoro, verkisto, kolumnisto kaj historiisto. Alirita la 18-an de julio 2023.
- 4 Nelson Falcão Rodrigues estis verkisto, ĵurnalisto, romanverkisto, dramisto, novelisto kaj kronikisto de brazilaj kutimoj kaj piedpilko. Li estas konsiderita la plej influa dra-misto en Brazilo. Alirita la 18-an de julio 2023.
- 5 IBGE – Brazila Instituto pri Geografio kaj Statistiko. Nacia specimena enketo pri hejmaj hejmoj, 2022. Havebla ĉe: <https://www.ibge.gov.br/> Alirita la 18-an de julio 2023.

6 Maryanne Wolf estas akademiulo, instruisto kaj aktivulo por infanoj kaj legopovo ĉirkaŭ la mondo. Ŝi estas UCLA-Loĝanta Profesoro pri Eduko, Direktoro de la UCLA Centro por Disleksio, Diversaj Lernantoj kaj Socia Justeco. Esplorado pri disleksio, legopovo en cifereca kulturo kaj legado de cerba cirkulado. Alirita la 18-an de julio 2023.

### Bibliografio

- Publicação Retratos da leitura no Brasil. <http://plataforma.prolivro.org.br/retratos.php>. Acesso em 18 de Julho de 2023.
- IBGE – Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística. Pesquisa nacional de amostra por domicílio, 2022. Disponível em: <https://www.ibge.gov.br/> Acesso em 18 de Julho de 2023.
- ABRANET – Associação Brasileira de Internet. Disponível em: <http://www.abranet.org.br/Noticias/Domicilios-com-acesso-a-internet-chegam-a-67%25,-mas-desigualdade-permanece-2526.html?UserActiveTemplate=site#.XXofldtKjVc>. Acesso em: 18 de Julho de 2023.
- DEL PRETTE, Z. A.; DEL PRETTE, A. Habilidades sociais e análise do comportamento: proximidade histórica e atualidades. Revista Perspectivas, v. 1, n. 2, p.104-115, 2010. BATISTA FILHO, O. H. A infância e a computação. 16 mar. 2011. Disponível em: <http://www.hardware.com.br/artigos/infancia-computacao/>. Acesso em: 18 de Julho de 2023.
- PAIVA, N. M. N.; COSTA, J. S.A influência da tecnologia na infância: desenvolvimento ou ameaça? 2015. Disponível em: [https://www.psicologia.pt/artigos/textos/A\\_0839.pdf](https://www.psicologia.pt/artigos/textos/A_0839.pdf). Acesso em: 18 de Julho de 2023.
- MARTINS, Ana Luiza; LUCA, Tania Regina de. Introdução: pelos caminhos da imprensa. In: Ana Luiz Martins; Tania Regina de Luca. *História da im-pressa no Brasil*. 2ª ed. São Paulo: Contexto, 2012
- BASILE, Marcelo. Projetos de Brasil e Constituição nacional na Imprensa Fluminense. In: BASTOS, Lúcia; MOREL, Marco; BESSONE. *Tânia. História e Imprensa: Representações culturais e práticas de poder*. Rio de Janeiro: FAPERJ, 2006.
- COSTA, Emília Viotti da. *Da monarquia à república: momentos decisivos*. 7. ed. São Paulo: Fundação Editora da UNESP, 1999.
- LUCA, Tania Regina de. A grande imprensa na primeira metade do século XX. In: MARTINS, Ana Luiza & \_\_\_\_\_ (Orgs.). *História da imprensa no Brasil*. 2 ed. São Paulo: Contexto, 2011.
- SODRÉ, Nelson Werneck. *História da Imprensa no Brasil*. Rio de Janeiro: Mauad, 1999.

## Nesufiĉa logiko

Provu klarigi la kiamon... Foje oni petis tiom al mi, en neatendebla momento. Jen la historio!

Mi estis instruanta al klaso de genaboj 11-jaraĝaj. La leciono temis pri konstelacioj, astronomiaj distancoj, planedoj... La laboro okazis trankvile kaj la lernantoj atenteme ĝuis la preskribon kaj kalkulojn postulatajn de studado de la universo... Pluraj interesaj demandoj invitis interesajn diskutadon. Subite lernanto interrompas la diskutadon kaj petas permeson fari demandon for de la leciono... Mi, kiel amanto de libereco kaj rajtoj, tuj jesis al li... Vi estas ĉi tie por demandi kaj mi por respondi... Kaj li demandis: “Instruisto, kiu faris ĉion ĉi...?” Mi ŝanceliĝis iomete... “Knabo”, mi respondis, “mi ne preparis la lecionon por tuŝi tiun detalon...” kaj li plu diris: “mi demandas ĉar la pastoro diri ke Dio faris ĉion ekzistantan, kaj diris ankaŭ ke Dio estas ununura tutpova estulo, kiu krome ekzistas en la tuta eterneco... Do, se tiel estas, tio signifas ke antaŭ ol komenci fari ion, li vivis sola, ĉu?”

Abrupte atombombo eksplodis ene de mia kapo! Kiel tiom juna knabo

rezonas tiom serioze... Mi ne kapablis trovi elirpordon al respondo, ĉar mi timis ke li ne komprenus “mian” vidpunkton. Kaj mi proponis al li atendi novan okazon repreni la dialogon pri lia dubo. Sed tio ne satigis mian enon, kaj kiam mi eniris la ĉambron de instruistoj, post la fino de la leciono, sen ia ajn dubo instruistino Ivanda, kiun mi ĉiam nomis “franjo”, ĉar ŝi estis evangeliulino, serioze demandis min: “Kio okazas, instruisto, kia estas via problemo, montrata per via mieno?... Tio estis vera ŝoko, esti demandata abrupte per “divenago”. Jes, franjo, mi havas problemon... Kaj rakontis al ŝi la ĵusan okazaĵon...”

Aŭskultinte la aferon, ŝi ameme ridis kaj per milda voĉo konsolis min... “Trankviliĝu, karulo, la knabo plene pravas... li uzis la homan logikon... iam li lernos uzi pli superan logikon, kiun lia kapo ankoraŭ ne kapablas enteni...”

Finfine mi trankviliĝis, kaj esperable tiu knabo scias nun ke Dio “kreis” ankaŭ la tempon...!

**Valdemir Moreira**

## Ruĝa Rozo

Frumatene mi vidis ruĝan rozon inter dornoj kaj haltis pro miro. Ĝi estis ŝprucita per perloj el la roso. La suno sendis siajn radiojn por saluti ĝin, kaj la rosgutoj trinkis ilin. Kaj antaŭ miaj okuloj ili kreis magion.

— Bela floro, mi demandis, kiel vi staras inter tiuj ĉi dornoj tute sola? Ĉu vi ne timas, ke ili sufokos vin?

— Kiu timas perdas ĉion, eĉ sian vivon. Ni estis kelkaj arbustoj, sed neniu prizorgis nin. Miaj najbaroj ek-timis kaj ili malaperis – forvelkis. Mi volis vivi, do mi kolektis miajn fortojn kaj pluivivis. La dornoj protektas min per folioj kaj branĉoj kontraŭ la vento, ili tenas la malsekecon proksime de mi, kaj mi dankas ilin per la bonodoro de miaj floroj. Ili ankaŭ floras kaj estas utilaj kiel herboj. Kiam niaj burĝonoj malfermiĝas, abeloj kaj papilioj flugas al ni. Birdoj kantas ĉirkaŭe. Mi estas feliĉa!

— Kaj vintre, kiam neĝo falas kaj malvarmo frostigas la Teron, inter la dornoj nudaj, kiel vi vivas?

— Ili konservas la neĝon kaj faras varman litkovrilon. Ni scias kiel venki malfacilaĵojn kune, ne fierante, sed helpante unu la alian. Jen kiel ni plu-vivas, revas kaj atingas niajn revojn.

— Pri kio iu floro povas revii?

— Por alporti ĝojon al aliaj!

**Elena Popova**



# La Municipa Nutraĵo-vendejo en San-Paŭlo

La urbego San-Paŭlo enhavas multajn turismajn allogaĵojn. Unu el ili estas aparte taŭga por amantoj de bongustaj nutraĵoj. La gastronomia riĉeco de la Municipa Nutraĵ-vendejo troviĝas en bela konstruaĵo, en la urbocentro (kvartalo Cantareira/kantarejra). Tie, pli ol 300 vendejoj proponas grajnoj, ĉokoladaĵojn, vianĉaĵojn, vinojn, bierojn, brandojn, dolĉaĵojn, fromaĝojn kaj spicaĵojn. Ĉiu-semajne po 50 mil homoj el Brazilaj foraj regionoj kaj el eksterlando vizitas ĝin por frandado. La tuta areo okupas pli ol 12000 m<sup>2</sup>. La arkitekturo estas majesta kaj vitraloj en gotika stilo, faritaj de rusa artisto, ornamas la tuton.

La konstruado de la vendejo daŭris kvar jarojn, kaj kompletigis en la jaro 1932. Pro tiama revolucia movado en Brazilo, ĝi estis uzita kiel deponejo de armiloj kaj municio. Fine oni inaŭguris ĝin je la 25-a de januaro 1933, je la dato de fondigo de la urbo San-Paŭlo.

En la dua duono de la 20-a jarcento, ĝi trapasis diversajn reformojn.

Ankaŭ muzikaj kaj teatraj spektakloj okazas en tiu loko, krom foiroj de metiaĵoj. Ĝi do fariĝis ia kulturcentro por diverstipaj publikoj.

La Vendejo malfermiĝas de lundo ĝis sabato, de la 6-a ĝis la 18-a horo, kaj en dimanĉoj kaj feriaj tagoj de la 6-a ĝis la 16-a horo.

Indas viziti tiun belan lokon en ŝan-Paŭlo!



# Projekto Savskatolo

**SHELTERBOX (SAVSKATOLO)** estis fondita en 2000 en la urbo Helston, Cornwall, UK fare de Rotariano kaj iama Royal Navy Search and Rescue Diver Tom Henderson, OBE, kiu elpensis la ideon pri “katastrofhelpilo” por familio, en formo de skatolo por rapida kaj facila tutmonda uzado”. Tiun saman jaron la Rotary Club of Helston-Lizard adoptis ĝin kiel sian Jarmilan Projekton.

La unua distribuado de 143 SAVSKATOLOJ (ShelterBoxes) estis sendita al viktimoj de la Guĝarata sismo en 2001. Dum la venontaj tri jaroj la projekto maturiĝis kaj antaŭ la fino de 2004 preskaŭ 2,600 kestoj estis ekspeditaj, post 16 gravaj katastrofoj. La bonfarado signife vastigis sian laboron en reago al la Hinda Oceana sismo kaj cunamo en 2004. Tom Henderson estis rekonita kiel CNN-Heroo en 2008, la ĉiujara premio de la reto, kiu honoras la ĉiutagajn civitanojn de la tuta mondo, kiuj ŝanĝas la mondon. En marto 2010



li fariĝis OBE fare de La Reĝino en Palaco Buckingham pro sia elstara kontribuo al bonfarado kaj homhelpa laboro ĉar li fondis ShelterBox en 2000.

## Rimarkindaj respondoj

Unu el la plej grandaj efikoj de ShelterBox estis en la magnituda sismo en Haitio en 2010. ShelterBox disponigis restejon por 28,000 familioj, aŭ proksimume 25% de ĉiuj tendoj liveritaj en lokoj ĉirkaŭ Portoprinco.

Post la Tōhokusismo kaj cunamo de 2011 en Japanio, ShelterBox disponigis asistadon al proksimume 1,600 familioj en la katastrofregiono.

En 2015 la bonfarada asocio respondis en Nepalo donante helpon al familioj kiuj perdis sian hejmon, post kiam forta sismo lasis 9,000 mortintojn kaj preskaŭ 22,000 vunditojn.

En 2017 Savigilaro respondis al uraganoj (kategorio 5) Irma kaj Maria en

Karibio. Helpo estis disponigita en la insuloj Sankta-Kito kaj Neviso, la Dominika Respubliko, Dominiko, Antigvo kaj Barbudo, kaj la Britaj Virgulininsuloj.

Koncerne konflikto-rilatajn respondojn, Sirio restas unu el la plej grandaj projektoj de Savigilaro. Ekde 2013, la bonfarado liveras krizhelpon al familioj trafitaj de la milito en Sirio.

Savigilaro uzas spursistemojn por monitori vetersistemojn ĉirkaŭ la globo kaj antaŭvidi la verŝajnan skalon de uraganoj kaj ciklonoj. Krome, kontraŭtertrema sistemo donas tujan avizon pri ajna sisma agado kiu povus rezultigi homhelpan katastrofon. Savigilaro laboras kun lokaj kaj internaciaj helpagentejoj kaj Rotariaj Kluboĵ tutmonde, kiuj ankaŭ transdonas informojn kiam ili konscias pri urĝa bezono de ŝirmejo.

Kun limo al resursoj, la bonfarado evoluigis kadraron de demandoj por helpi fari decidojn, certigante ke la plej vundeblaj familioj estu apogitaj. Kie tiuj ĉi respondo-kriterioj estas plenumitaj, kaj vizo kaj sekureckondiĉoj tion permesas, tie teamo povas esti deplojita ene de 48 horoj.

### **ShelterBox Responda Teamo**

La Respondo-Teamo de Shelterbox (SRToj) konsistas el operacia kunlabor-

antaro kaj volontuloj bazitaj ĉirkaŭ la mondo. Ili estas tre edukitaj krizŝirmaj specialistoj.

ShelterBox estas la Projekta Partnero de Rotary en Katastrofoj ekde 2012, sed la rilato estis longdaŭra, reirante al la naskiĝo de la bonfarado. Kio komenciĝis kiel loka ligo kun unu kornvala Rotary Club, tio kondukis al internacia movado kiu akiris pli ol £ 54 milionojn por ShelterBox ĝis nun. La partnereco etendiĝas multe preter financa subteno. Ĉirkaŭ 1.000 Rotary-membroj estas implikitaj en ShelterBox kiel volontuloj, kunlaborantaro aŭ respondteamanoj. Rotariaj kluboj tutmonde ofertas praktikan helpon por helpi ShelterBox atingi pli da familioj post katastrofo aŭ konflikto.

### **Internaciaj filioj**

ShelterBox-filioj estas teamoj stariĝitaj en malsamaj partoj de la mondo. Ili laboras kun ShelterBox por provizi subtenon en monokolektado volontulado kaj multaj pli. Kelkaj el la plej grandaj filioj de ShelterBox situas en Usono, Kanado kaj Aŭstralio, sed la internacia reto de filioj disetendiĝas al pli ol 15 landoj tutmonde.

**João Otávio Veiga Rodrigues**



# Helena

Plia romano de **Machado de Assis** tradukita de Paulo S. Viana kaj eldonata de EASP.

*La libro estos lanĉita okaze de la 15-a Esperanto-Kongreso de la Ŝtato San-Paŭlo okazonta en Mogi das Cruzes inter la tagoj 30/sep - 01/okt 2023*

